

**Robert Louis  
Stevenson**

**La botelodiablo**



rakontotraduko

Estis iam viro sur la insulo Havajo, kiun mi volas nomi Keave, ĉar li ankoraŭ vivas, tial ni devas prisilenti lian nomon; sed lia naskiĝloko estas malproksime de Honaunau, kie la ostaro de Keave la Granda kuŝas kaŝita en kaverno. Tiu viro estis povra, sen timo kaj diligenta; li povis legi kaj skribi kiel instrumastro, krome li estis bonega maristo, veturis sur la insulaj vaporŝipoj kaj stiris balenkaptistan ŝipon ĝis la bordo de Hamakua. Fine li ekhavis la ideon rigardi foje la vastan mondon kaj eksterlandajn urbojn. Tial li dungigis kiel maristo sur ŝipo, kiu velis al San-Francisko.

Tio estas rava urbo kun rava haveno kaj nenombreble multaj riĉaj homoj kaj tute eksterordinara monteto kovrata de palacoj. Tie Keave iutage promenis, kun monujo plena de mono kaj rigardis plezurigite la grandajn domojn je ambaŭ flankoj. „Kiaj ravaj domoj tie estas, kaj kiom feliĉaj devas esti la homoj, kiuj loĝas en ili kaj ne devas okupiĝi pri la sekva tago“, Keave pensis, kiam li venis al domo, kiu estis pli malgranda ol kelkaj aliaj sed mirinde bela kaj pura kiel ludilo; la ŝtupoj de la domo brilis kiel arĝento kaj la randobedoj de la ĝardeno floris kiel girlandoj kaj la fenestroj estis helaj kiel juveloj. Keave haltis kaj estis ravita de la

tuta pompo, kiun li vidis; kaj dum li estis kaptita de la vidaĵo, li rimarkis viron, kiu rigardis lin rekte post fenestro tra vitrotabulo tia blanka, ke Keave vidis lin tute precize, tiel, kiel oni vidas fiŝon en flaka truo super rifoĵ. La viro ne estis plu juna, li estis kalva kaj havis nigran barbon, kaj lia vizaĝo estis zorgoplena kaj li ekĝemis kun acida humoro. La vero estas, ke tiam, kiam Keave rigardis internen al la viro kaj la viro eksteren al Keave, ili reciproke enviis sin.

Sed subite ridetis la viro, kapjesis al Keave, mansigne vokis lin al si kaj salutis lin je la sojlo de la domo.

„Mi havas ĉi tie belan domon“, parolis la viro kaj ĝemis ve-spire. „Ĉu vi eble foje volus rigardi la ĉambrojn?!“

Li montris la tutan domon al Keave, de la kelo ĝis la subtegmento, kaj troviĝis nenio, kio ne estis perfekta laŭ sia speco, kaj Keave miris.

„Efektive“, diris Keave, „tio estas mirinde bela domo. Se mi povus vivi en simila, mi ridus dum la tuta tago kaj ĝojus. Kiel tio povas esti, ke vi ĝemas en tiu kazo?“

„Mi ne konas kaŭzon, kial vi ne havu domon tute similan al tiu ĉi“, eĉ pli fajnan, se vi volus. Vi certe havas iom da mono ĉe vi, ĉu?“

„Mi havas kvindek dolarojn“, diris Keave, „sed domo kiel tiu ĉi kostas pli ol kvindek dolarojn.“

La viro ekkalkulis. „Estas bedaŭrinde, ke vi ne havas pli“, li diris, „ĉar tio estontece povos kaŭzi malfacilaĵojn al vi. Sed por kvindek dolaroj ĝi estu via.“

„La domo, ĉu?“ demandis Keave.

„Ne, ne la domo“, respondis la viro, „sed la botelo, ĉar mi ankoraŭ devas diri al vi – kvankam mi ŝajnas al vi tiom riĉa kaj bonstata – ke mia tuta posedo kaj tiu ĉi domo kaj eĉ ties ĝardeno devenis nur de botelo, kiu havas kapaciton ne pli grandan ol pindo. Jen ĝi.“

Nun li malfermis la seruron de kesto kaj elprenis rondan botelon kun longa kolo. La vitro estis blanka kiel lakto kaj glimis per ĉiuj koloroj de ĉielarko. En la

interno io iom moviĝis kiel ombro kaj fajro.

„Jen la botelo“, diris la viro, kaj kiam Keave ridis, li demandis: „Ĉu vi ne fidas al mi? Tiukaze konvinku vin mem, provu, ĉu vi povos frakasi ĝin.“

Tial Keave prenis la botelon kaj ĵetadis ĝin sur la plankon, ĝis li fariĝis laca, sed ĉiufoje ĝi saltis supren kiel ludpilko kaj restis sen damaĝo.

„Tio estas stranga aĵo“, diris Keave, „ĉar tiukaze, se oni tuŝas ĝin kaj ĝin rigardas, ĝi ŝajne estas el vitro.“

„El vitro ĝi estas“, rimarkis la viro kaj ĝemis pli laŭte ol iam ajn antaŭe. „Sed ĝia vitro estas formita en la flamoj de la infero. Diableto loĝas en ĝi. Kaj ĝi estas tiu ombro, kiu tie moviĝas, almenaŭ mi supozas tion. Se iu estas aĉetinta la botelon, la diablo estas je ties servo kaj kion ajn la posedanto deziras – amon, famon, monon, domojn kiel tiu ĉi, aŭ eĉ urbon kiel tiu – ĉion tion li havos, se la dezirvorto estas dirita. Napoleono havis tiun botelon, per ĝi li fariĝis la reganto de l' mondo, sed fine li vendis ĝin kaj renversiĝis. Kapitano Cook havis tiun botelon, kaj per ĝi li trovis la vojon al tiom da insuloj, sed ankaŭ li

vendis ĝin kaj estis mortbatita en Havajo. Ĉar, se vi vendos ĝin, via potenco kaj via protekto estos nuligitaj kaj malbone vi vivos, se vi tiam ne kontentiĝos pri tio, kion vi havos ekde tiam.“

„Kaj tamen vi parolas pri tio vendi ĝin, ĉu?“  
demandis Keave.

„Mi havas ĉion tion, kion mi deziras kaj mi fariĝas pli kaj pli aĝa“, respondis la viro. „Jen deziro, kiun la diableto ne povas plenumi – li ne povas plilongigi la vivon kaj tio estus malhonesta, se mi volus prisilentigi tion al vi, jen malavantaĝo de la botelo, ĉar tiukaze, se homo mortos antaŭ ol vendi la botelon, tiu homo devos bruli en la infero dum eterneco.“

„Mi estas certa, tio estas malavantaĝo kaj ne nur eraro“, vokis Keave. „Mi ne riskos tion. Mi povas ekzisti sen domo, danke al Dio. Sed estas io, kion mi ne povus elteni, kaj tio estas esti kondamnita.“

„Karulo, ne hastu tiom“, respondis la viro. „Ĉion, kion vi devos fari estas uzi la potencon de la diablo modeste kaj poste vendi ĝustatempe la botelon al iu

alia, tiel, kiel mi vendos ĝin nun al vi, por ke mi finu la vivon en komforto.“

„Nu, en tiu kazo mi ne komprenas du aferojn“, diris Keave.

„Vi ĉiam ĝemas kiel enamiĝinta virgulino, jen unu afero, kaj la alia: „Vi volas vendi tiun botelon por tre malalta prezo.“

„Mi jam rakontis tion al vi, kial mi ĝemas“, respondis la viro. „Mi faras tion, ĉar mi timas, ke mia sano baldaŭ finiĝos, kaj kiel vi mem diras, estus ja por ĉiu homo bedaŭrinda afero, se li devus iri al la diablo. Kial mi vendas ĝin tiom malkare, mi devas klarigi al vi, estas speciala afero pri la botelo. Antaŭ longa tempo, kiam la diablo portis ĝin je la unua fojo surteren, ĝi estis eksterordinare multekosta, kaj unuafoje ĝi estis vendita por multaj milionoj da dolaroj al la presbitero Johano, sed oni ne povas vendi ĝin sen monperdo. Se vi vendas ĝin por tiu prezo, kiun ĝi kostis al vi, ĝi revenos al vi kiel leterkolombo. Rezultiĝas el tio, ke la prezo dum la iro de la jarcentoj pli kaj pli falis, kaj nun ĝi sekve fariĝis rimarkinde malmultekosta. Mi aĉetis ĝin de unu el miaj grandaj najbaroj sur tiu ĉi monteto kaj la prezo,

kiun mi pagis, estis nur naŭdek dolaroj. Mi povus vendi ĝin al vi por okdek naŭ dolaroj kaj naŭdek naŭ cendoj, sed eĉ ne unu cendon pli kara, por ke ĝi ne revenu al mi. Sed pri la afero estas du ĝenaĵoj. Unue, se vi ofertas tian unikan botelon por nur okdek dolaroj, la homoj pensas, ke vi mistifikas ilin. Kaj krome – sed tio ne urĝas, kaj mi ne devas detaligi tion. Sed memortenu tion bone, ke ĝi devas esti kontanta mono, por kiu vi vendas ĝin.“

„El kio mi sciu, ke ĉio ĉi estas vera?“ demandis Keave.

„Unu detalon vi ja tuj povos elprovi“, respondis la viro. „Donu al mi viajn kvindek dolarojn, prenu la botelon kaj deziru, ke la mono revenu en vian poŝon. Se tio ne okazos, mi promesas je mia honoro, ke mi nuligos la negocon kaj redonos al vi la monon.“

„Kaj vi ne trompas min, ĉu?“ demandis Keave.

La viro sankte ĵuris, ke ne.

„En ordo, tiom mi riskos, ĉar tio ne povos damaĝi al



mi.“ Kaj Keave pagis sian monon al la viro kaj tiu transdonis la botelon al li.

„Botelodiablo, mi volas rehavi miajn kvindek dolarojn.“ Kaj tuj, kiam li estis dirinta tion, lia poŝo estis denove tiom peza, kiom antaŭe.

„Tio estas certa, ke ĝi estas botelo mirinda“, diris Keave.

„Kaj nun bonan matenon, kamarado mia, kaj la diablo akompanu vi, anstataŭ mi!“

„Haltu“, vokis Keave. „Nun la ŝerco estu finita. Jen, reprenu vian botelon.“

„Vi aĉetis ĝin por malpli ol mi pagis por ĝi“, respondis la viro kaj frotis siajn manojn. „Nun ĝi estas via, kaj je mia parto, min koncernas nur plu tio, ke mi vidu vian dorson.“ Kaj dum tio li eksonoris al sia ĉina servisto, por ke tiu konduku la viron Keave eksteren.

Tiam, kiam Keave estis denove sur la strato, kun la

botelo subbrake, li pensis: „Se ĉio pri la botelo estas vera, mi faris perdonegocon. Sed eble la viro nur mistifikis min. La unuan, kion li faris, estis nombri sian monon. La sumo estis precize kvardek naŭ usonaj dolaroj kaj unu dolaro el Ĉilio. Tio aspektas kvazaŭ vera. Nun mi provos la alian detalon.“

La stratoj en tiu parto de la urbo estis puraj kiel ŝipferdeko, kaj kvankam estis tagmezo, tie ne estis promenantoj. Keave metis la botelon en la stratdefluejon kaj foriris. Dufoje li turnis sin malantaŭen, kaj jen denove staris la lakte kolora kaj larĝe rondigita botelo tie, kien li metis ĝin. Li turniĝis je tria fojo kaj iris en flankstraton. Kaj apenaŭ li faris tion, puŝiĝis io kontraŭ unu el liaj kubutoj. Jen vidu, estis la longa kolo de la botelo, kiu rektiĝis supren, kaj ĝia ronda botela korpo estis ŝtopita en lian pilotmantelon.

„Ŝajne ĝi estas efektive vera“, diris Keave.

La sekva, kion li faris, estis aĉeti en magazeno korktirilon kaj retiriĝi al sekreta loko sur la kampoj. Tie li provis eltiri la korkon, sed tiom ofte, kiom li provis eltiri ĝin, la korktirilo denove elglitis kaj la korko restis sendifekta.

„Tio estas nova speco de korko“, diris Keave kaj subite li komencis tremi kaj ŝviti, ĉar li ektimis la botelon.

Sur sia revojo al la havenkvartalo li vidis magazenon, en kiu viro vendis de la pli sovaĝaj insuloj konkojn, klabojn, paganajn sanktaĵojn, malnovajn monerojn kaj bildojn el Ĉinio kaj Japanio kaj ĉion, kion la maristoj kunportas en siaj kestoj. Tie li ekhavis ideon. Li eniris kaj ofertis la botelon por cent dolaroj. Unue la viro en la magazeno ridis pri li kaj ofertis kvin; sed efektive, ĝi estis kurioza botelo. Tian vitron ankoraŭ neniu vitristo blovformis en kiu ajn homa vitrofarejo, tre bele trembrilis la koloroj sur la lakte kolora blanko kaj tre stranga ombro ŝvebis en la mezo. Marĉandinte dum certa tempo, kiel tio estas kutima ĉe tiaj homoj, la komercisto donis sesdek arĝentajn dolarojn por la aĵo kaj metis ĝin sur bretaron en la mezo de la montrofenestro.

„Nu“, parolis Keave, „tiukaze mi do vendis ĝin por sesdek dolaroj, kvankam mi aĉetis la botelon por kvindek, do, por diri la veron, eĉ por iom pli, ĉar unu el miaj dolaroj estis el Ĉilio. Nun mi foje volas trovi la veron pri la alia afero.“

Poste li reiris al la ŝipo, kaj kiam li malfermis sian maristan keston, kuŝis tie la botelo kaj sekve revenis pli rapide ol li mem.

Keave havis maaton sur la ŝipo, kiu nomiĝis Lopaka.

„Kio suferigas vin? Kial vi fikse rigardas al via kesto?“

Ili estis solaj en la antaŭferdeko kaj Keave devigis lin silenti pri la afero kaj poste rakontis ĉion.

„Tio estas tre stranga“, diris Lopaka, „kaj mi timas, ke la botelo ankoraŭ afliktigos vin. Sed unu afero estas tute klara. Ĉar vi havos ĉagrenon tute certe, vi ankaŭ utiligu la negocon. Pripensu tion, kion vi volas havi. Sciigu viajn dezirojn, kaj se la diableto faros tion, kion vi ordonas al li, mi mem aĉetos la botelon de vi, ĉar mi volus havi propran skunon kaj ekkomerco sur la insuloj.“

„Tio ne estus mia prefero“, diris Keave. „Sed posedi belan domon kaj ĝardenon sur la bordo de Kona, kie

mi estas naskita, kun sunradioj enradiantaj tra la pordo, kun floroj en la ĝardeno, vitrofenestroj, kun bildoj sur la muroj kaj ludiloj kaj fajnaj tapiŝoj sur la tabloj kaj nepre tia, kia la domo, en kiu mi estis hodiaŭ – nur kun etaĝo pli alta, kaj ĉie kun balkonoj kiel en la reĝa palaco por vivi en ĝi sen afliktoj kaj ĝoji kun miaj amikoj kaj parencoj.“

„En ordo“, diris Lopaka, „ni kunprenu ĝin al Havajo, kaj se ĉio ĉi plenumiĝos tiel, kiel vi supozas, mi aĉetos la botelon, tiel, kiel mi jam diris, kaj serĉos skunon.“

Pri tio ili interkonsentiĝis, kaj ne daŭris longan tempon ĝis la ŝipo reveturis al Honoluluo, kun Keave, Lopaka kaj la botelo. Ili apenaŭ surbordiĝis, kiam ili renkontis amikon sur la bordo, kiu kondolencis Keavon.

„Mi ne scias, kial vi kondolencas min“, diris Keave.

„Ĉu tio eblas, ke vi ankoraŭ ne aŭdis tion?“ diris la amiko, „via onklo – tiu bona olda viro – mortis kaj via kuzo, tiu linda knabo, dronis en la maro.“

Keave profunde afliktiĝis, li komencis plori kaj plendi kaj forgesis la botelon. Sed Lopaka pensis siamaniere, kaj tuj, kiam la aflikto de Keave ekmalpliĝis, li diris: „Mi pripensis la sekvan, ĉu via onklo eventuale havis terposedojn en Havajo, en la distrikto de Kaŭ, ĉu?“

„Ne“, diris Keave, „ne en Kaŭ, ili estas sur la montara flanko iom pli sude de Hookena.“

„Tuj terposedoj nun apartenos al vi, ĉu?“

„Pri tio mi certas“, respondis Keave kaj denove plendis pri la perdo de siaj parencoj.

„Ne“, diris Lopaka, „ne lamentu ĝuste en tiu momento, mi havas ideon. Kiel tio estus, se tion ĉion kaŭzis la botelo? Jen do la loko preta por via domo.“

„Se tio estus tiel“, kriis Keave, „la diablo ofertis aĉan servon al mi per tio, ke li murdis miajn parencojn. Sed efektive povus esti, ke vi pravas, ĉar ĝuste tiel aspektis la loko, sur kiu mi imagis mian domon mense per miaj okuloj.“

„Sed la domo ankoraŭ ne estas konstruita“, diris Lopaka.

„Ne, kaj tio verŝajne ankaŭ ne okazos“, diris Keave, „ĉar spite al tio, ke mia onklo kultivis iom da kafo, kavao kaj bananojn, ĝi nur iom komfortigos min, ĉar la restaĵo de la terposedo estas nigra lafo.“

„Ni iru al la advokato“, diris Lopaka. „Mi havas la penson ankoraŭ nun en mia kapo.“

Kiam ili poste alvenis ĉe la advokato, montriĝis, ke la onklo de Keave ege riĉiĝis en la lastaj tagoj kaj postlasis fonduson.

„Kaj tio estas do la mono por via domo!“ kriis Lopaka.

„Se vi pensas pri via nova domo“, diris la advokato, „mi donos al vi la vizitokarton de nova arkitekto, pri kiu oni aŭdas frapan.“

„Pli bone kaj pli bone“, kriis Lopaka. „La tuta vojo jam estas ebenigita al ni. Ni do daŭrigu la obeadon de la ordonoj.“

Tial ili iris al la arkitekto kaj tiu havis desegnojn de domoj sur sia tablo.

„Vi volas havi ion eksterordinaran, ĉu?“ demandis la arkitekto. „Kiel plaĉas tio ĉi al vi?“ kaj li transdonis desegnon al Keave.

Apenaŭ Keave ekvidis la desegnon, li ekkriis laŭte, ĉar ĝi estis desegno de lia domo ĝuste tiel desegnita, kiel li imagis ĝin.

„Mi estas por la domo, kvankam ne plaĉas al mi la maniero, kiel mi ricevos ĝin, sed mi ĝin posedos, ĉu mi volas, ĉu ne, kaj mi akceptu do kun la malica ankaŭ la bonan.“

Tial li rakontis al la arkitekto ĉiun el siaj deziroj kaj diris al li, kiel li volas havi meblita la domon kaj li menciis la bildojn sur la muro kaj la ornamajn surtablajn figuretojn kaj li demandis la viron



senkaŝe, por kioma sumo li transprenos la tutan aferon.

La arkitekto multe demandis, prenis sian krajonon kaj faris kalkuladon, kaj kiam li estis preta, li nomis ekzakte la sumon, kiun Keave heredis.

Lopaka kaj Keave rigardis sin reciproke kaj kapjesis.

„Estas tute evidente, ke mi posedu tiun domon“, pensis Keave, „ĉu mi volas ĉu ne. Ĝi venas de la diablo, kaj mi timas, ke atendos min apenaŭ io bona. Sed pri unu afero mi certas: mi deziros nenion plu de la botelo, tiom longe, kiom mi posedos tiun botelon. Sed la domon mi havos surnuke, kaj mi akceptu la bonan kun la malica.“

Tiel li interkonsentiĝis kun la arkitekto kaj ili subskribis kontrakton. Keave kaj Lopaka denove surŝipiĝis kaj forvelis al Aŭstralio, ĉar ili preparolis inter si, ke ili ne enmiksiĝu, sed lasu konstrui kaj aranĝi la domon al la arkitekto kaj la botelodiablo laŭ ties propraj plaĉoj.

La vojaĝo estis sukcesa, sed Keave apenaŭ diris vorton dum la tuta tempo, ĉar li ĵuris ne plu deziri ion kaj ne plu profiti de la diablo. La tempo por la konstruado estis finita, kiam ili revenis. La arkitekto sciigis al ili, ke la domo estas preta kaj Keave kaj Lopaka entreprenis vojaĝon per la ŝipo „Hall“ al Kona, ili eliris tie por rigardi la domon kaj kontroli, ĉu ĉio estas farita laŭ la pensoj de Keave.

Jen la domo staris sur la monto kaj estis rigardebla de la ŝipo. Supre la arbaro leviĝis ĝis la pluvnuboj; malsupre etendiĝis la nigraj lafaj klifoj, kie antaŭtempe la malnovaj reĝoj estis entombigataj. En la domĝardeno floris la floroj ĉiukolore kaj maldekstre troviĝis papaja arbareto kaj dekstre panarbareto kaj antaŭe leviĝis ŝipmasto kun flago. La trietaĝa domo mem havis ampleksajn ĉambrojn, al ĉiu apartenis granda balkono. La fenestroj estis el vitro kaj tiaj bonegaj, ke ili estis klaraj kiaj akvo kaj helaj kia tago. Ĉiuj specoj de mebloj ornamis la ĉambrojn. Pentraĵoj pendis je la muroj en oraj kadroj, bildoj de ŝipoj, de batalantaj viroj, plej belaj inoj kaj unikaj pejzaĝoj. Nenie en la mondo estas la bildoj tiel helaj kaj koloraj, kiel la trovitaj en la domo de Keave. Kaj la ornamitaj figuretoj estis tute eksterordinaraj: sonoretaj horloĝoj kaj muzikskatoloj, malgrandaj viroj kapjesantaj, libroj

plenaj de ilustraĵoj, valorplenaj armiloj el la tuta mondo kaj plej elegantaj puzloj por plezurigi solecan viron dum ripozo. Kaj ĉar neniu provus loĝi en tiaj ĉambroj, sed nur tramigrus ilin por rigardi ĉion, la balkonoj estis tiel vastspace konstruitaj, ke sur ili tuta urbo oportune trovus lokon. Keave ne sciis kion preferi, ĉu la verandon malantaŭan, kie oni estas elmetita al terinterna brizo kaj havas rigardon al la fruktarbaretoj kaj al la florĝardeno, ĉu al la balkona fronto, kie oni povas spiri la maran venton kaj rigardi sub la kruta vando de la monto la ŝipon „Hall“, kiu trafikas unufoje aŭ dufoje dum semajno inter Kookena kaj la montetoj de Pele, aŭ la skunojn, kiuj regule preterveturas la bordon por ŝarĝi kaj transporti lignon, kavaon kaj bananojn.

Rigardinte ĉion, Keave kaj Lopaka sidiĝis sur la verandon.

„Nu, ĉu ĉio estas tia, kia vi imagis ĝin?“ demandis Lopaka.

„Vortoj ne povus esprimi tion“, diris Keave, „Ĝi estas pli bona ol mi sonĝis kaj mi estas pli ol nur kontenta.“

„Sed unu afero estas ankoraŭ konsiderinda“, diris Lopaka. „Ĉio ĉi eble okazis tamen tute laŭnature, kaj la botelodiablo tute ne havas ion por diri pri tio. Se mi aĉetus la botelon kaj ne ricevus la skunon, mi vane estus metinta manon en la fajron. Mi promesistion al vi, mi scias, sed mi tamen pensas, ke vi prezentu almenaŭ unu pruvon al mi.“

„Mi ĵuris, ke mi ne plu havigos avantaĝojn al mi, mi jam sufiĉe falis“, diris Keave.

„Tio ne estas avantaĝo, pri kiu mi pensas“, diris Lopaka. „Temas nur pri tio, ke mi vidu la diablon mem. Jen nenio gajneblus per tio kaj do ankaŭ nenio, pri kio oni devus honti, kaj tamen, se mi unufoje vidus lin, mi estus certa pri la afero. Do indulgu min kaj lasu min rigardi la diablon, post tio mi aĉetos ĝin, jen la mono miamane.“

„Jen nur unu afero, kiun mi timas“, diris Keave. „La diablo povus estis tre naŭza, se oni vidas lin, kaj se vi foje estus rigardinta lin, vi povus esti tre malinklina akiri la botelon.“

„Mi estas viro, kiu tenas siajn promesojn“, diris

Lopaka. „Jen la mono metata inter ni.“

„Tre bone“, diris Keave. „Mi estas scivola. Do, elvenu, lasu vin foje rigardi, *Mr.* Diablo.“

Tuj kiam tio estis dirita, la diablo rigardis el la botelo kaj poste malaperis tiel rapide kiel lacerto. Keave kaj Lopaka sidis kiel ŝtonigitaj. Jam eknoktiĝis antaŭ ol ambaŭ kapablis ion diri kaj voĉigi ĝin. Tiam Lopaka ŝovis la monon al Keave kaj prenis la botelon.

„Mi estas viro, kiu tenas siajn promesojn“, diris Lopaka, „kaj se mi ne estus tia, mi tuŝus la botelon eĉ ne per piedo. En ordo, mi ricevos mian skunon kaj dolaron aŭ du en mian poŝon, kaj tiam mi liberigos min de la diablo tiom rapide, kiom tio eblos. Por diri al vi la tutan veron, lia aspekto ŝokis min.“

„Lopaka“, diris Keave, „ne pensu pli aĉe pri mi ol necesas. Mi scias, ke estas nokte kaj la vojoj aĉaj, kaj ke ne estas bona ideo preteriri tombejon tiom malfrue, sed mi devas diri, ke de tiu momento, kiam mi vidis tiun malgrandan vizaĝon, mi povas nek manĝi, nek dormi nek preĝi, tiom longe, kiom mi scios pri ĝi en mia proksimeco. Mi donos lanternon

al vi kaj korbon por la botelo kaj ĉiun bildon aŭ raraĵon en mia domo, kiu vekas vian plaĉon – sed tuj ekiru kaj dormu en Hookena ĉe Nahinu.“

„Keave“, diris Lopaka, „multaj viroj malbone akceptus tion, ke mi foriru, speciale tial, ĉar mi tiel amikece penis teni mian promeson kaj aĉeti la botelon, sub la cirkonstanco, ke la nokto kaj la tenebro kaj la vojo preter la tomboj estas dekfoje pli danĝera por viro, kies konsciencon ŝargas pekoj kaj tia botelo ĉebrake. Sed miaparte, mi estas tiom ekstreme terurigita, ke mi ne havas la koron riproĉi vin. Nun mi do ekiros kaj preĝos al Dio, ke vi estu feliĉa en via domo kaj ankaŭ mi kun mia skuno, kaj, ke ni ambaŭ fine tamen ankoraŭ envenu la ĉielon, spite al la diablo kaj ties botelo.“

Tiel Lopaka foriris malsupren de la monto kaj Keave staris sur sia frontbalkono kaj aŭskultis la klakadon de la ĉevalhufoj kaj rigardis la lanternon, kiu prilumis la vojon malsupren kaj la klifojn de la kavernoj, kie la praaj antaŭuloj estis entombigataj, kaj dum la tuta tempo li tremis kaj premis kontraŭ siaj manoj kaj preĝis por sia amiko kaj gloris Dion, ke li mem eskapis de tiu mizera afero.

Sed la sekva tago komenciĝis tre hele kaj lia nova domo aspektis tiel grandioza, ke li forgesis sian terurigon. Sekvis tago post tago, kaj Keave loĝis tie ŝajne en seninterrompa ĝojo. Lia preferata loko estis sur la verando malantaŭe, tie li manĝis kaj vivis kaj legis la rakontojn en la Honolulu-gazetoj. Sed, se iu volis preteriri, li tamen eniris kaj rigardis la ĉambrojn kaj la bildojn. Kaj la domo fariĝis fama eĉ malproksime. Oni nomis ĝin en la tuta Kona *Ka—Hale Nui* Granda Domo kaj ĉeokaze ankaŭ: Pura Domo. Keave dungis ĉinon, kiu de matene ĝis vespere forigis polvon kaj poluradis la meblojn. La vitraĵoj, la oro, la fajnaj ŝtofoj kaj la bildoj brilis hele kiel mateno. Kaj Keave mem ne povis iri tra la ĉambroj sen kanti, tiel plifaciligite li sentis sin, kaj kiam surmare preterveturis ŝipo, li hisis sian flagon je la masto.

Tiel la tempo pasis, ĝis kiam Keave iutage venis al Kailua por viziti siajn amikojn kaj flegi amikecojn. Tie oni bone regalis lin, kaj je la sekva mateno li foriris tiel rapide, kiel tio eblis kaj rajdis streĉe, ĉar urĝis lin revidi sian belan domon; kaj krome proksimiĝis la nokto, en kiu ĉe Kona la mortuloj el longe pasintaj tempoj vagas; kaj ĉar li jam ligis kontrakton kun la diablo, li eĉ pli memgardis ne renkonti mortintojn. Tuj post Honaunau, rigardante

al fora horizonto, li ekvidis inon, kiu banis sin rande de la maro, kaj ŝajne ŝi estis belkreskinta junulino, sed li ne atentis ŝin. Poste li ekvidis flirti ŝian blankan subĉemizon, kiam ŝi surmetis ĝin, kaj poste tre longan ruĝan robon, nomata *holokuo*\* en Havajo. Kaj kiam li aperis fronte de ŝi, ŝi estis fininta sian vestaraĝon kaj suprenvenis de la maro kaj staris ĉe la vojrande en sia ruĝa robo. Ŝi estis tute freŝigita per la banado kaj ŝiaj okuloj brilis kaj rigardis afable. Tuj kiam Keave ekvidis ŝin, li haltigis per la bridilo sian ĉevalon.

„Mi pensis, ke mi konas ĉiun en tiu ĉi regiono“, li diris. „Kiel okazis, ke mi ne konas vin?“

„Mi estas Kokua, la filino de Kiano“, diris la knabino kaj mi ĝuste revenis de Oahu. Kiu estas vi?“

„Mi tion tuj rakontos al vi,“ diris Keave, deseliĝante. „Sed ne tuj. Ĉar mi pensas tiel: se vi sciis, kiu mi estas, vi certe aŭdis ion pri mi, kaj ne respondus honeste. Sed diru al mi unue la sekvan: Ĉu vi estas geedziĝinta?“

Pri tio Kokua laŭte ekridis. „Ĉu estas vi tiu, kiu metas



demandojn?“ ŝi redemandis. „Ĉu vi mem estas geedziĝinta?“

„Mi ne estas, efektive, Kokua“, respondis Keave, „kaj ĝis ĉi tiu horo mi eĉ ne pensis pri tio. Sed nun la tuta vero. Mi renkontis vin ĉi tie vojrande, mi vidis viajn okulojn, kiuj estas kiel steloj, kaj mia koro flugis tiel rapide kiel birdo al vi. Do, se vi tute ne ŝatas min, diru tion, kaj mi reiros al mia propra hejmo; sed tiukaze, se vi ne trovas min pli aĉa ol iun alian junan viron, tuj diru tion kaj mi iros kun vi al via patro, kaj matene mi parolos kun la bona viro.“

Kokua ne diris ion, sed rigardis al la maro kaj ridis.

„Kokua,“ diris Keave, „se vi diras nenion, mi akceptos tion kiel bonan respondon; ni do marŝu al la pordo de via patra domo.“

Ŝi avancis fronte de li, ankoraŭ nun sen diri ion; sed de tempo al tempo ŝi retrorigardis al li kaj poste deturniĝadis, tenante la rubandojn de sia ĉapelo per la buŝo.

Nun, kiam ili venis al la dompordo, Kiano elpaŝis sur la verandon kaj kriis nomon kaj bonvenigis Keaveon. Ĉimomente la knabino turnis la rigardon, ĉar la famo de la Granda Domo atingis ŝiajn orelojn; kaj certe estis granda granda tento. La tutan vesperon ili estis ĝojaj kune kaj la knabino petolis kaj aŭdacis antaŭ la okuloj de ŝiaj gepatroj, kaj mokadis la viron Keave, ĉar ŝi estis rapidsprita. Je la sekva tago Keave interparolis kun Kiano, kaj poste li trovis la knabinon sola.

„Kokua,“ li diris, „vi mistifikis min dum la tuta vespero; kaj ankoraŭ ne estas tro malfrue por forsendi min. Mi ne volis diri al vi, kiu mi estas, ĉar mi havas tiom belan domon kaj mi timis, ke vi povus pensi tro pri la domo kaj maltro pri la viro, kiu amas vin. Nun vi scias ĉion, kaj se vi deziras, ke mi foriru, diru tion tuj.“

„Ne,“ diris Kokua; sed ĉifoje ŝi ne ridis, kaj Keave siavice ne demandis plian.

Tio estis la fianĉiĝpeto de Keave; la afero disvolviĝis tiel rapide kiel flugas sago, sed tiel kiel sago flugas aŭ kiel fusilkuglo flugas eĉ pli rapide, tamen ambaŭ povas trafi celon. La afero okazis rapide, kaj li eĉ tre

sukcesis, ĉar la penso pri Keave firmkroĉiĝis en la kapo de la knabino; ŝi aŭdis lian voĉon en la bruado de la surfoj kontraŭ la lafaj rokoj, kaj por tiu juna viro, kiun ŝi vidis nur dufoje, ŝi eĉ estus foirinta de la gepatroj kaj de sia hejminsulo. Kaj ankaŭ la ĉevalo de Keave flugis sur la montopado malsupre de la klifaj kaverntomboj kaj la hufklakado kaj la plezura kantado eĥis en la kavernoj de la mortintoj. Li venis al la Granda Domo kaj kantis ankoraŭ nun. Li sidis kaj manĝis en vasta balkono kaj la ĉino miris pri tio, ke lia mastro kantis inter la manĝomordoj. La suno sinkis en la maron, la nokto komenciĝis kaj Keave migris sur la balkonoj ĉe la lampolumoj supre surmonte kaj lia kantovoĉo ekscitis la virojn sur la ŝipoj.

„Jen mi nun do atingis la vivkulminon“, li diris al si mem. „Pli agrabla la vivo ne povus esti, tio estas la montopinto, kaj de nun ĉio povas nur pli malboniĝi ĉirkaŭ mi. Nun mi volas eklumigi je la unua fojo la ĉambrojn kaj bani min en mia superba banejo kun varmega kaj frida akvoj kaj dormi sola en la lito de mia fianĉĉambro.“

Sekve al tio la ĉino ricevis ordonojn post la vekiĝo kaj ekbruligis la fornojn; kaj kiam li laboris sube apud la kaldronoj, li aŭskultis kanti kaj ĝoji sian mastron en

la lumigataj ĉambroj. Kiam la akvo fariĝis varmega, vokis lin la ĉino kaj Keave venis al la banĉambro; kaj la ĉino aŭdis lin kanti dum plenigis sin la marmorbaseno; kaj li aŭdis lin, kiam Keave sin senvestigis, ĝis kiam subite finiĝis la kantado. La ĉino aŭskultis kaj aŭskultis kaj vokis supren al Keave por demandi, ĉu ĉio estas en ordo. Kaj Keave respondis al li: „Jes“, kaj li petis lin enlitiĝi; sed ne plu estis kantado en la Granda Domo; kaj dum la tuta nokto la ĉino aŭdis la senpaŭzajn rondirajn paŝojn de sia mastro sur la balkonirejo.

Sed la vero estis: kiam Keave demetis la vestojn por bani sin, li vidis sur sia korpo makulon aspekantan kiel likeno sur roko, jen la momento, kiam la kantado finiĝis; ĉar Keave, konis tiajn aferojn kaj sciis, ke li difektiĝis je la Ĉina Malico, je lepro. Estas ja malĝojiga afero por kiu ajn viro, ekhavi lepron. Kaj estus malĝojiga por kiu ajn devi forlasi domon tian belan kaj komfortan kaj devi adiaŭi sin de ĉiuj siaj amikoj, al la norda bordo de Molokai inter la gigantajn klifojn kaj surfojn. Sed kia suferiga bato tio estis en la kazo de Keave; li, kiu trovis sian amon nur hieraŭ kaj gajnis ĝin je mateno kaj nun vidis disrompi ĉiujn siajn esperojn dum unu momento, kiel vitro.

Dum certa tempo li sidis sur la rando de la bankuvo, poste li eksaltis kun krio kaj kuris eksteren, kaj tien kaj tien, laŭ la balkono, kiel desperanto.

„Tute volonte mi povus forlasi Havajon, la hejmlandon de mia patro“, pensis Keave. „Tute facilanime mi povus forlasi mian domon, la alte situantan, la multfenestran, ĉi tie sur la montoj. Tute kuraĝe mi povus iri al Molokai, al Kalaupapa ĉe la klifoj, por vivi inter la lepruloj kaj dormi eterne tie, malproksime de miaj patroj. Sed kion malĝustan mi faris, kiu peko ŝarĝas mian animon, ke mi renkontis Kokuan, kiam ŝi vespere refreŝigite paŝis el la akvo? Kokua, la enirintino de mia animo! Kokua, la lumo de mia vivo! Mi neniam edziĝos al ŝi, mi neniam plu rigardos ŝin, mi neniam plu tuŝos ŝin permane; estas tial, estas pro vi, ho, Kokua, ke mi tiom plendas!“

Nun oni do vidas, kia homo estis Keave, ĉar li estus povinta loĝi ankoraŭ dum jaroj en la Granda Domo, kaj neniu divenus ion pri lia malsano. Sed tio estus sen valoro por li, se li devus perdi la amatinon. Kaj krome li estus povinta edzinigi ŝin; kaj tiom da viroj farus tion, ĉar ili havas la animojn de porkoj; sed Keave amis la knabinon kiel viro kaj tial li ne volis dolorigi ŝin kaj ne elmeti ŝin al iu danĝero.

Tuj post noktomezo li ekmemoris la botelon. Li iris al la verando kaj revokis la tagon, kiam la diablo elrigardis de la botelo kaj dum tiu penso glaciigis ties vejnoj.

„Timiga aĵo estas tiu botelo“, pensis Keave, „timiga estas ankaŭ la diablo, kaj estas timige riski la flamojn de la infero. Sed kiun alian esperon mi havus por saniĝi kaj edzinigi Kokuan. Kiun?! Ĉu mi defiis la diablon nur por havi domon kaj ne por alfronti lin je dua fojo por gajni ŝin?“

Dum tio li rememoris, ke estos sekvatage, kiam la skuno „Hall“ preterveturos dum ties reveturo al Honolulu. „Tien mi devos iri unue“, li pensis, „por renkonti Lopakan; la plej granda espero, kiun mi momente havas, estas trovi tiun botelon, de kiu mi liberigis min tiel plezure.“

Eĉ ne iomete li povis dormi; la manĝo firmkroĉiĝis en lia gorĝo, sed li sendis leteron al Kiano, kaj kiam estis tempo por la alveno de la vaporŝipo, li rajdis malsupren preter la klifoj de la tomboj. Pluvis, lia ĉevalo paŝis peze, li rigardis supren al la nigraj buŝoj de la kavernoj, kaj li enviis la mortulojn, kiuj dormas

tie kaj liberas de ĉiuj zorgoj; kaj li rememoris, kiel li galopis monte supren nur tagon antaŭe kaj li miris. Tiel li descendis al Hookena, kaj tie la tuta loĝantaro de la lando kolektiĝis por la vaporŝipo kiel kutime. En la remizo antaŭ la stokejo la homoj sidis kaj ŝercis kaj interŝanĝis novaĵojn; sed estis tute neniu parolemo en la brusto de Keave. Kaj li sidis en ilia mezo, rigardis en la pluvon, kiu falis ekstere sur la domojn, kaj al la surfo, kiu frapadis la rokojn, kaj ĝemado leviĝis en lia gorgo.

„Keave de la Granda Domo estas sensprita“ diris iu el la aliaj. Efektive, tiel estis, kaj tute ne estis miraklo.

Poste venis la ŝipo, kaj la remboato transportis lin al tie. Ferdeke pobe troviĝis multaj blankuloj, kiuj vizitis la vulkanon kiel kutime, mezŝipe estis kanakoj, kaj la antaŭŝipo estis ŝarĝita per sovaĝaj bovoj el Hilo kaj ĉevaloj el Ka'ū, sed Keave sidis aparte de ĉiuj kun sia aflikto kaj elrigardis pro la domo de Keano. Jen ĝi aperis, proksime de la bordo inter la nigraj rokoj kaj en la ombro de la kokospalmoj, kaj ĉe la enirpordo estis ŝi kun la ruĝa holokuo\*, kiu ne estis pli granda ol muŝo kaj ŝi iradis tien kaj tien kun muŝa vigleco.

„Ha, reĝino de mia koro,“ li kriis, „Mi riskos mian

animon, amata, por gajni vin!“

Baldaŭ poste krepuskiĝis, kaj la kajutoj estis iluminataj kaj la blankuloj sidiĝis kaj ludkartis kaj trinkis viskion, tiel, kiel ili kutimis tion; sed Keave migradis dum la tuta nokto sur la ferdeko kaj la tutan sekvan tagon, kiam ili vaporveturis lee\*\* de la insuloj Maui aŭ Molokai, li ankoraŭ tiam paŝadis kiel sovaĝa besto en menaĝerio.

Kiam vesperiĝis, ili pasis la Diamantokrateron kaj venis al la kajo de Honoluluo. Keave deŝipiĝis kun la aliaj kaj komencis demandi pri Lopaka. Ŝajne li fariĝis la posedanto de skuno – eĉ de la plej bona tiuregione havigebla – kaj li faris aventurveturon al Pola-Pola aŭ Kahiki; tial de Lopaka ne havigeblis helpo. Keave rememoris pri unu el ties amikoj, certa advokato en la urbo, (kies nomon mi prefere ne menciui) kaj enketis pro li. Oni diris, ke li subite fariĝis riĉa kaj havas belan novan domon ĉe la bordo de Waikiki; kaj tial Keave havis la ideon voki taksion, kiu veturis lin al la domo de la advokato.

La domo estis tute nova, kaj la arboj en la ĝardeno ne estis pli grandaj ol promenbastonoj, kaj la advokato, kiam li alvenis, laŭmiene aspektis kiel tre kontenta



viro.

„Kiel mi povas servi vin?“ diris la advokato.

„Vi estas amiko de Lopaka“, respondis Keave, „kaj Lopaka aĉetis de mi certan aĵon, pro kiu mi pensas, ke vi povus helpi al mi trovi lin.“

La vizaĝo de la advokato fariĝis tute morna. „Mi ne asertas, ke mi ne komprenas vin, sinjoro Keave“, li diris, kvankam tio estas aĉa negoco esti memorigata pri tiu afero. Estu certa, ke mi scias nenion konkretan, kaj tamen mi supozas, ke tiukaze, se vi demandus je certa loko, vi supozeble ekscius novaĵojn.“

Kaj li diris la nomon de viro, kiun mi ankaŭ prefere ne diros. Tiel tio daŭris dum tagoj kaj Keave kuradis de unu al la alia, trovis ĉie novajn vestojn kaj veturilojn, kaj belajn novajn domojn kaj ĉie virojn tre kontentajn; sed tuj kiam li aludis sian aferon, iliaj vizaĝoj tordiĝis.

„Sendube mi estas sur la ĝusta spuro“, pensis Keave.

„Tiuj novaj vestoj kaj veturiloj estas ĉiuj la donacoj de la eta diablo, kaj tiuj glataj vizaĝoj estas vizaĝoj de viroj, kiuj uzis sian avantaĝon kaj poste bonŝance liberiĝis de la damnita aĵo. Se mi vidos palajn vangojn kaj aŭdos suspirojn, mi scios, ke mi proksimas al la botelo.“

Tiel okazis fine, ke li estis rekomendata al blankulo en la Beritania strato. Kiam li venis al la pordo je la vespermanĝa tempo, li trovis la kutimajn signojn de nova domo, novan ĝardenon, kaj elektran lumon radiantan tra fenestraj vitroj; sed kiam la posedanto aperis, esperiga ŝoko trakuris la viron Keave; ĉar antaŭ li estis junulo morte pala, kun nigraj ringoj sub la okuloj, kun taŭzita hararo kaj kun tia mieno, kian povus havi viro, kiun atendas la pendumilo.

„Ĉi tie ĝi estas kun certo,“ pensis Keave, kaj tial li tuj rekte parolis al li. „Mi venis por aĉeti la botelon.“

Aŭdinte tion, la juna blankulo de la Beritania strato apogis sin al muro.

„La botelo!“ li diris spiregante. „Por aĉeti la botelon!“ Poste li ŝajnis sufokiĝi, kaj brake kaptante Keave-on,

li kondukis lin en ĉambron kaj elverŝis vinon en du glasojn.

„Jen mia respekto“, diris Keave, kiu ofte renkontis blankulojn en la pasinta tempo. „Jes“, li aldonis, „mi venis por aĉeti la botelon. Kiun prezon ĝi havas nun?“

Dum tiu frazo falis la glaso elmane de la juna viro, kaj li rigardis al Keave, kvazaŭ tiu estus fantomo.

„La prezo“, li diris; „la prezo! Ĉu io ne estas en ordo pri la prezo?“

„Mi ja demandis vin pri tio,“ objetis Keave. „Sed kial vi estas tiom konsternita? Ĉu io ne estas en ordo pri la prezo?“

„Ekde via tempo la prezo tre konsiderinde malpliĝis, *Mr. Keave*“, balbutis la juna viro.

„En ordo, en ordo des malpli mi devos pagi por ĝi. Kiom ĝi kostis al vi?“

La juna viro estis blanka kiel paperfolio „Du cendojn“, li diris.

„Kiom?“ kriis Keave, „du cendojn? Tial, do, pro tio vi povos vendi ĝin nur por unu. Kaj tiu, kiu prenos ĝin ...“ La vortoj mortis sur lia lango; se oni aĉetus ĝin, oni neniam povus vendi ĝin denove. La botelo kaj la botelodiablo devus resti ĉe la aĉetinto, kaj post ties morto oni devus transporti ĝin al la ruĝa fino en la infero.

La juna viro de la Beritania strato falis sur la genuojn. „Pro Dio, aĉetu la botelon!“ li kriis. „Mi krome donos al vi mian tutan posedon je tiu marĉando. Mi estis freneza, kiam mi aĉetis ĝin por tiu prezo. Mi defraŭdis monon en mia magazeno; aliokaze mi estus perdita; punita per prizono.“

„Povra ulo“, diris Keave, „vi riskis vian animon per tia desperplena aventuro, kaj por eviti la laŭordan punon pro via hontiga ago; kaj vi pensas, ke mi povus heziti, kvankam temas pri amo. Donu al mi la botelon kaj la ŝanĝmonon, kiun vi certe jam tenas preta. Jen la kvincendo.“

Estis tiel, kiel Keave supozis; la juna viro havis la ŝanĝmonon en tirkesto; la botelo ŝanĝis la posdedanton kaj Keave apenaŭ ĉirkaŭprenis perfingre la botelan kolon, kiam li jam elspiris la deziron esti sana viro. Efektive, kiam li alvenis hejmen, li senvestis sin antaŭ spegulo en sia ĉambro. Jen, efektive, lia haŭto aspektis kiel tiu de infano. Nun okazis la stranga afero: apenaŭ li vidis la miraklon, ŝanĝiĝis lia animstato, kaj li subite tute fajfis pri la naŭzo kontraŭ la Ĉina Malico, kaj ankaŭ Kokua apenaŭ plu interesis lin; kaj li havis plu nur la penson, ke li nun kaj por eterne estos ligita al la botelodiablo kaj lia plej bonŝanca espero estos fariĝi cindrero en la flamoj de la infero. Antaŭ si li jam vidis flagri ĝin en sia imago. Kaj lia animo teruriĝis kaj tenebro falis sur la lumon.

Kiam Keave iom rekonsciiĝis, li memoris, ke estos ĉi-nokte, kiam ludos la orkestro en la hotelo. Tien li nun iris, ĉar li timis esti sola; kaj tie, meze de la feliĉaj vizaĝoj, li migris tien kaj tien, kaj aŭdis la supren- kaj malsupreniradon de la melodioj kaj vidis, kiel la orkestra estro Berger direktis la takton, kaj ĉiam denove li aŭdis kraketi la flamojn kaj vidis bruli la ruĝan fajron en la abisma foskaptilo. Subite la orkestro ludis la *Hiki-ao-ao-n*; jen kanto, kiun li

kantis kun Kokua, kaj ĉe tiuj sonoj revenis la kuraĝo al li.

„Ĝi estas nun farita“, li pensis „kaj je plia fojo mi akceptu la bonan kun la malica.“

Tiel do okazis, ke li revenis kun la vaporŝipo al Havajo, kaj tiel rapide kiel tio eblis, okazis nun la nupto kun Kokua kaj li kondukis ŝin sur la montoflanko al la Granda Domo.

Nun estis kun la geo tiel, ke la koro de Keave trankviliĝis, se ili estis kunaj; sed tuj kiam li estis sola, li falis en hororan cerbumadon kaj aŭdis la kraketadon de l' flamoj kaj vidis bruli la ruĝan fajron en la abisma foskaptilo. La knabino, efektive, venis tute al li; ŝia koro saltadis ĉe lia flanko, ŝiaj manoj unuiĝis kun liaj; kaj ŝi aspektis tiel plaĉe de la hararo ĝis la ungoj de la piedfingroj, ke neniu povis rigardi ŝin sen ĝojo. Ŝi estis ĉarma laŭ naturo. Ŝi ĉiam tenis pretaj afablajn vortojn. Plena de kantoj ŝi estis. Kaj ŝi iris tien kaj tien en la Granda Domo, ŝi estis la plej brila estaĵo en la tri etaĝoj, jubilanta kiel birdo. Kaj Keave rigardis kaj aŭdis ŝin kun plezuro, kaj poste devis kunŝrumpi ĉeflanke kaj plori kaj ĝemi, kiam li pensis pri la prezo, kiun li pagis; kaj poste li devis

sekigi siajn okulojn kaj lavi sian vizaĝon kaj iri kaj sidi kun ŝi sur la granda ĉirkaŭdoma balkono, aliĝante al ŝiaj kantoj kaj respondante kun malsana spirito ŝiajn ridetojn.

Iam venis la tago, kiam ŝiaj piedoj ekpezis kaj ŝiaj kantoj fariĝis maloftaj; kaj nun estis ne nur Keave, kiu ploris ĉeflanke, ŝed ĉiu el ili dispartiĝis de la alia, kaj ili sidis en transflanka balkono kun la tuta larĝeco de la Granda Domo intere. Keave sinkis tiom en sian desperon, ke li apenaŭ rimarkis la ŝanĝon kaj nur ĝojis, ke li havas pli da horoj por sidi sola kaj por cerbumi pri sia destino kaj ne tiom ofte devas montri ridetantan vizaĝon kun malsana koro. Sed je iu tago, kvazaŭ alveninte ŝtelirante en la Grandan Domon, li aŭskultis la plorsingultan sonadon de infano, kaj jen Kokua kuŝis sur la balkona planko kaj turnadis sian vizaĝon kaj ploris kiel la perditoj.

„Vi agas bone, ke vi ploras en tiu ĉi domo, Kokua“, li diris, „kaj tamen mi fordonus mian kapon, se almenaŭ vi je la fino povus esti feliĉa.“

„Feliĉa!“ ŝi kriis. „Keave, kiam vi vivis sola en via Granda Domo, vi estis sur la insulo la enkorpiĝo por feliĉa viro, ridado kaj kantado estis sur viaj lipoj, kaj

via vizaĝo estis radianta kiel sunleviĝo. Poste vi edzinigis la povran Kokuan; kaj nur Dio scias, kio estas tiom malĝusta je ŝi, – ke ekde tiu tago vi ne plu ridetis. Ve! Kio mankas al mi? Mi pensis, ke mi estas linda kaj mi scias, ke mi amas vin. Kio mankas al mi, ke tiu morna nuboj metiĝis sur mian edzon?“

„Povra Kokua,“ diris Keave. Li sidiĝis apud ŝi kaj provis preni manon de ŝi, sed ŝi retiris ĝin. „Povra Kokua,“ li diris ankoraŭfoje. „Kompatinda mia – linda mia. Kaj mi pensis, ke mi ĉion ĉi povas kaŝi al vi! En ordo, vi do eksciis ĉion. Tiukaze vi almenaŭ havos kompaton al la plorinda Keave; tiukaze vi komprenos, kiom mi amis vin pasintece, ke mi riskis la inferon por via posedo, kaj kiom multe mi ankoraŭ nun amas vin (mi, la povra kondamnito), tiom, ke mi ankoraŭ nun povas formi rideton, kiam mi rigardas vin.“

Post tio li rakontis ĉion, eĉ de la komenco.

„Tion vi faris por mi?“ ŝi kriis. „Ho, bone tiel, kial mi do plu afliktiĝu?!“ Kaj ŝi ĉirkaŭbrakumis lin kaj ploris.



„Aĥ, karulino!“ diris Keave, „kaj tamen, se mi konsideras la fajron de la infero, tio tamen tre ŝargâs mian animon!“

„Ne diru tion,“ ŝi diris; „neniu viro povas perdiĝi, nur ĉar li amas Kokuan, kaj kiu krome neniel misagis, Keave, mi savos vin per tiuj miaj manoj aŭ mi pereos kiel via akompananto. Nu! Vi amis min kaj donis vian animon al mi, kaj tamen vi pensas, ke mi ne pretus morti por savi vin miaflanke?“

„Aĥ, mia kara! Vi povus morti centfoje, kion tio ŝanĝus?“ li kriis, „escepte de tio, ke vi forlasus min ankoraŭ antaŭ ol komenciĝos efektive la tempo de mia kondamniteco.“

"Vi scias nenion," ŝi diris. „Mi estis edukita en lernejo de Honoluluo; mi ne estas kutima knabino. Kaj mi diras al vi, mi savos mian amaton. Kion, kion vi diris pri la cendo? Sed la mondo entute estas ne nur usona. En Britujo ili havas moneron nomata *Farthing*, kiu valoras ĉirkaŭ duonon de cendo. Aĥ! Domaĝe!“ ŝi kriis, „tio farus ĝin apenaŭ pli bona, ĉar la aĉetonto estus perdita, kaj ni trovus neniun, kiu estus tia bravulo kia nia Keave! Sed, krome ekzistas ja Francio; ili havas tie monereton, kiun ili nomas

centimo, kaj ĉirkaŭ kvin da ili havas valoron de cendo aŭ ion similan. Pli bone ni ne povus fari tion. Ek, Keave! Ni iru al la francaj insuloj, ni iru al Tahiti, tiom rapide, kiom ŝipo povos porti nin tien. Jen ni havos kvar centimojn, tri centimojn, du centimojn, unu centimon; kvarfoje eblos pliaj vendoj al posedontoj kaj du el ili fare de ni por antaŭenpuŝi la negocon. Ek, Keave mia! Kisu min kaj ŝovu flanken la zorgojn. Kokua defendos vin.“

„Donaco de dio!“ li kriis. „Mi ne povas imagi, ke Dio volas puni min, ĉar mi sopiris ion tian bonan! Estu do tiel, kiel vi volas, konduku min tien, kien plaĉas al vi: „Mi metas mian vivon kaj mian savon en viajn manojn.“

Frue matene Kokua preparis sin por la vojaĝo. Ŝi prenis la keston de Keave, kun kiu li marvojaĝis; unue ŝi enmetis la botelon en angulon kaj poste ŝi aldonis siajn plej valorajn vestojn kaj la plej impresajn ornamajn figuretojn de la domo. „Ĉar, ni devas prezenti nin kiel riĉaj homoj, kiu aliokaze akceptus la botelon?“ Dum la preparado ŝi estis tiel gaja kiel birdeto; nur dum ŝi rigardis al Keave, ploroj montriĝis sur ŝia vizaĝo, kaj ŝi devis kuri al li kaj kisi lin. Sed de Keave estis prenita ŝarĝo de la animo; nun, ĉar ŝi dividis lian sekreton, kaj estante kun certa

espero je si, li ŝajnis esti nova viro, li paŝis facilpiede surtere, kaj la spirado estis denove plezuro por li. Kaj tamen teroro estis plu je lia flanko; kaj ĉiam denove, tiel, kiel la vento blove estingas kandelon, mortadis la espero en li, kaj li vidis la flamojn kaj la bruladon de la inferfajro.

Disvastiĝis en la lando la mesaĝo, ke ili entreprenas plezurvojaĝon al Usono, kio ŝajnis esti stranga afero, kaj tamen ĝi ne estis tiel stranga, kiel la vero, se iu estus kapabla diveni ĝin. Tial ili iris al Honolulu per la ŝipo „*Hall*“, kaj de tie kun aro da blankuloj per la „*Umatilla*“ al San-Francisko, kaj de San-Francisko li pasis transen per la poŝtbrigantino „*The Tropic Bird*“ al Papeete, la ĉefurbo de la francoj en la sudaj insuloj. Tien ili venis post plezura vojaĝo je agrabla tago de la pasato kaj vidis la rifon kun la surfado kaj la insuleton Motuiti kun ties palmoj kaj la skunon troviĝantan je la rodo kaj la blankajn domojn de la urbo, kiuj troviĝis laŭ la bordo inter verdaj arboj, kaj supre de ili estis la montoj kaj la nuboj de la blanka insulo Tahiti.

Ili opiniis, ke estas plej saĝe lui domon kontraŭe al la transflanka Brita Konsulejo por tie imprese paradi per mono kaj mem kapti atenton per ĉaroj kaj ĉevaloj. Tio estis tre facile farebla, tiom longe, kiom

ili posedis la botelon; ĉar Kokua estis pli aŭdaca ol Keave, kaj se ŝi havis ideon pri io, ŝi vokis la koboldon pro dudek aŭ cent dolaroj. Tiel ili baldaŭ tre frapis la atenton en la urbo; kaj la fremduloj el Havajo, iliaj rajdadoj, ties fajnaj vestoj kaj la valorplenaj punktoj de Kokua fariĝis la temo de multaj interparoloj.

Post komencaj problemoj pri la lingvo de Tahitio, ili bone progresis pri ĝi, ĉar ĝi estas efektive simila al la lingvo de Havajo, spite al ŝanĝoj de certaj literoj; kaj tuj, kiam ili havis la laŭordan kapablon paroli, ili intense provis vendi la botelon. Konsideru, ke tio ne estis afero facila enkonduki tion. Ne estis facile konvinki la homojn serioze, ke oni ofertas vendi neelĉerpeblan fonton de sano kaj riĉo por kvar centimoj. Estis krome necese klarigi la danĝerojn de la botelo, kaj tamen la homoj aŭ tute ne akceptis la tutan aferon kaj ridis aŭ ili pensis des pli pri la pli morna flanko, fariĝis serioze afliktitaj kaj retiriĝis de Keave kaj Kokua, kiel de personoj, kiuj negocas kun la diablo. Anstataŭ gajni terenon, ili komencis troviĝi kiel evitatoj en la urbo; la infanoj forkuris kriante de ili, jen afero ne tolerebla de Kokua; katolikoj krucumis sin, dum ili preteriris; kaj ĉiuj homoj per unu fojo komencis retiriĝi de la novaj konatoj.

Jen depresio ekokupis iliajn spiritojn. Post la penoj de la tago ili sidis en sia nova domo kaj ne ŝanĝis eĉ vorton aŭ la silento estis rompata per subitaj plorsingultoj de Kokua. De tempo al tempo ili preĝis kune; kelkfoje ili sidis la tutan vesperon surplanke kun la botelo kaj observis kiel la ombro ŝvebas en la mezo. Je tiuj tempoj ili timis enlitiĝi. Daŭris longan tempon antaŭ ol ili ekdormis, kaj kiam iu el ili endormiĝis, tio vekis la alian kaj montris tiun silente ploranta, aŭ eble vekigis la dormanto mem, dum la alia fuĝis de la domo kaj de la najbareco de tiu botelo por paŝadi ĉe la bananujoj aŭ migri sur la plaĝo sub lunlumo.

Estis tiel ankaŭ en certa nokto, kiam Kokua vekigis. Keave estis foririnta. Ŝi palpis la liton kaj lia loko estis frida. Jen timo atakis ŝin kaj ŝi sidiĝis en la lito. Iom da lunlumo penetris tra la fenestropordoj. La ĉambro estis hela kaj ŝi povis observi la botelon sur la planko. Ekstere blovis la vento forta, la grandaj aleaj arboj ĝemegis kaj la falintaj folioj susuris en la verando. Meze de tio Kokua rimarkis alian sonon; ĉu de besto ĉu de viro; ŝi apenaŭ povis rakonti, sed la sonado estis morte malgajiga kaj sufokis ŝian gorĝon. Softe ŝi leviĝis, malfermis fendete larĝe la pordon kaj rigardis sur la lunluman ĝardenon. Tie ĉe la

bananujoj kuŝis Keave kun la buŝo sur la polvo kaj kuŝante li ĝemis.

La unua penso de Kokua estis kuri al li kaj konsoli lin; ŝia dua penso kun potenco haltigis ŝin. Keave antaŭ ŝi montriĝis kiel kuraĝa viro; ŝi trovis malmulte taŭga hontigi lin per sintrudemo en la horo de ties malforteco. Pensante tion, ŝi retiriĝis en la domon.

„Dio en la ĉielo!“ ŝi pensis, „kiom senatenta mi estis – kiom malforta! Estas li, kaj ne mi, kiu troviĝas en tiu eterna danĝero; estas li, ne mi, kiu ŝargis sian animon per tiu malbeno. Estas por mia bonfarto, kaj por la amo al kreaturo, kiu tiom malmulte valoras kaj estas tiom malriĉa je helpeblo, ke li nun havas tiom proksime de si la flamojn de la infero – kaj ke li odoras la sulfuron el ĝi, kuŝanta tie ekstere en la vento kaj lunlumo. Ĉu mi estas tiom obtuzigita spirite, ke mi neniam ĝis nun konjektis mian devon, aŭ ĉu mi konis la devon antaŭe kaj turniĝis flanken? Sed nun mi fine prenos mian animon en ambaŭ manojn kun amo; nun mi diros adiaŭ al la blankaj ŝtupoj ĉielen kaj al la vizaĝoj de miaj atendantaj amikoj. Mian amon por lia amo, kaj mia amo estu samranga al tiu de Keave! Mian animon por lia animo, eĉ se mi devos pereji pro tio!“

Ŝi estis rapidmana kaj tial baldaŭ vestita. Ŝi prenis la ŝanĝmonon – la valorplenajn centimojn, kiujn ŝi ĉiam retenis ĉe si; ĉar tiuj moneroj estas malofte uzataj, ŝi havigis kelkajn da ili el registara oficejo. Kiam ŝi staris sur la aleo, la vento kunŝovis nubojn kaj la luno nigriĝis. La urbo dormis, kaj ŝi ne sciis kien turniĝi, ĝis kiam ŝi aŭdis tuseti homon en la ombro de la arboj.

„Maljunulo,“ diris Kokua, “kion vi faras ĉi tie surstrate en la frida nokto? “

La oldulo apenaŭ povis esprimi sin pro la tusetado, sed ŝi elaŝkultis, ke li estas ne nur maljuna, sed ankaŭ povra, kaj fremdulo en la insulo.

„Ĉu vi pretas fari servon al mi?“ demandis Kokua.  
„Kiel fremdulo al alia kaj kiel maljunulo al junulino, ĉu vi pretas helpi al filino de Havajo?“

„Aĥ“, diris la oldulo. „Do estas vi la sorĉistino de la ok insuloj, kaj eĉ mian animon maljunan vi provas impliki. Sed mi eksciis pri vi, kaj mi rezistas vian fi-sorĉon.“

„Sidigu vin,“ diris Kokua, „kaj mi sciigos rakonton al vi.“ Kaj ŝi rakontis al li la historion de Keave de la komenco ĝis la fino.

„Kaj nun,“ ŝi diris, „mi estas lia edzino, kiun li akiris kun la bonfareco de sia animo. Kaj kion mi faru? Se mi mem irus al li kaj ofertus aĉeti la botelon, li rifuzus tion. Sed, se irus vi tien, li vendus ĝin kun fervoro. Mi atendos vin ĉi tie; vi aĉetos ĝin por kvar centimoj kaj mi reaĉetos ĝin por tri. Kaj Dio donu al povra ino forton!“

„Se vi celas fian,“ diris la oldulo, „mi supozas, ke Dio mortbatos vin.“

„Li farus!“ kriis Kokua. „Certu, ke li farus tion. Mi ne povus esti tiel insida – Tion Dio ne indulgus.“

„Donu la kvar centimojn al mi kaj atendu min je tiu ĉi loko“, diris la maljunulo.

Kiam Kokua nun staris sola sur la strato, ŝi fariĝis tute senkuraĝa. La vento hurlis en la arboj kaj por ŝi



ĝi sentiĝis kiel la bruaj flamoj de la infero; la ombroj ŝanceliĝis en la lumo de la stratlanterno, kaj ili aspektis al ŝi kvazaŭ manoj de malicaj spiritoj. Se ŝi havus la forton, ŝi forkurus, kaj se ŝi havus sufiĉe da spiro, ŝi devus ekkrii laŭte; sed ŝi povis fari nek tion nek tion ĉi kaj staris tremante en la aleo, kiel timigita infano.

Poste ŝi vidis reveni la oldulon, li tenis la botelon permane.

Li diris: „Mi plenumis vian deziron, poste mi forlasis vian edzon, kiu ĝojigite larmis kiel infano, ĉinokte li dormos trankvile.“ Kaj li etendis la botelon al ŝi.

„Antaŭ ol vi donos ĝin al mi“, diris Kokua anhele, „prenu la malican kun la bona – petu esti liberigita de via tusado.“

„Mi estas maljunulo“, obĵetis la viro, „kaj tro proksime ĉe la rando de la tomba pordo por akcepti favoraĵon de la diablo. Sed pri kio temas? Kial vi ne prenas ĝin, ĉu vi hezitas?“

„Ne, tute ne“, kriis Kokua. „Mi estas nur senforta. Donu iom da tempo al mi. Estas miaj manoj, kiuj spitas, mia karno kun timo retroevitas de la malbenita aĵo! Atendu momenton.“

La oldulo afable rigardis Kokuan. „Kompatinda knabino!“ li diris: „Via timo, via animo trompas vin. En ordo, lasu la botelon ĉe mi. Mi estas olda kaj sur tiu ĉi mondo ne plu povos trovi feliĉon, ankaŭ ne en la alia mondo...“

„Donu ĝin al mi!“ forte spirante diris Kokua. „Jen via mono. Ĉu vi pensas, ke mi povus esti tiel fia? Donu la botelon.“

„Dio benu vin, karulino,“ diris la oldulo.

Kokua kaŝis la botelon en sia holokuo\*, diris adiaŭ al la oldulo kaj foriris sur la aleo, ne zorgante kien. Ĉar ĉiuj stratoj estis kvazaŭ samaj al ŝi kaj kondukis ĉiuj en la inferon. Dum certa tempo ŝi iris, kaj certan tempon ŝi kuris; kelkfoje ŝi laŭte kriis en la nokton, kaj kelkfoje ŝi kuŝis ĉe la vojrandoj en la polvo kaj larmis. Ĉion tion, kion ŝi aŭskultis pri la infero, revenis al ŝi, ŝi vidis ekflami la fajrojn; kaj ŝi odoris la

fumon, kaj ŝia karno kvazaŭ velkis sur la karboj.

Antaŭ mateniĝo ŝi rekonsciiĝis kaj iris al la domo. Estis tute tiel, kiel diris la oldulo. Keave agrable dormis kiel infano. Kokua staris antaŭ li kaj rigardis lian vizaĝon.

„Nu, kara edzo, estas via vico dormi. Kiam vi vekigĝos, estos vi tiu, kiu kantas kaj ridos. Sed por la kompatinda Kokua – ho ve! Tion mi ne diris kun fia intenco – nek plu estos dormo nek kantado, nek raviteco, nek surtere nek en la ĉielo.“

Dirinte tion, ŝi sternis sin en sia lito je lia flanko kaj ŝia mizero estis tiom grandega, ke ŝi tuj ekdormis profunde.

Malfrue matene ŝia edzo vekis ŝin kaj sciigis al ŝi la bonan novaĵon. Ŝajnis tiel, kvazaŭ li estus tute ekster si pro plezuro, ĉar li tute ne atentis ŝian aflikton, kvankam ŝi nur malbone povis kaŝi ĝin. La vortoj kunpremis ŝian gorĝon, sed ne ŝanĝis ion, ĉar li parolis plu. Ŝi eĉ ne manĝis iomete, sed kiu observu tion? Keave malplenigis la pladon. Kokua vidis kaj aŭdis lin tiel, kiel strangan aferon en sonĝo; estis

tempoj, kiam ŝi forgesis ĉion aŭ pridubis ĉion, kaj tial ŝi metis manon al la frunto por scii sin mem kondamnita. Aŭdi babili la edzon, ŝajnis al ŝi monstraĵo.

Dum la tuta tempo Keave manĝis kaj parolis kaj forĝis planojn por la tempo post la hejmiro kaj dankis al ŝi por la savo kaj karesis ŝin kaj nomis ŝin fidela elaĉetintino. Li ridis pri la oldulo, ĉar li estis sufiĉe stulta por aĉeti la botelon.

„Li aspektis kiel maljuna honorindulo“, diris Keave.  
„Sed neniuj povas juĝi iun laŭ ties aspekto. Ja kial tiu olda malaprobindulo akiris la botelon?“

„Edzo mia,“ humile diris Kokua „lia intenco eble estis bona.“

Keave ridis kolere.

„Blablabla!“ li kriis. „Olda fripono, jen li, tion mi diras al vi, kaj olda azeno krome. Estis sufiĉe malfacile vendi la botelon por kvar centimoj; sed por tri tio estos tute ne ebla al li. La margĉeno ne estas

sufiĉe ampleksa, la aĵo komencas fi-odori ekbruligita — grrr!“ li diris, kaj li ekstremis hororigite. „Estas vere, mi aĉetis ĝin mem por cendo, kvankam mi tute ne sciis, ke ekzistas moneroj pli malgrandaj. Mi kondukis tiel, kiel ŝtipkapulo pro miaj turmentoj; ke ne plu troviĝos aliulo, ĉar tiu, kiu laste havos la botelon, kunprenos ĝin en la inferon.“

„Ho, edzo mia!“ diris Kokua. „Ĉu ne estas terura afero savi sin mem per la eterna pereco de aliulo? Ŝajnas al mi, ke mi ne povus ridi pri tio. Mi estus humiligita. Mi estus plena de melankolio. Mi preĝus por la kompatinda posedanto de la botelo.“

Tial Keave, sentante la veron pri tio, kion ŝi diris, fariĝis eĉ pli ĉagrenigita. „Ĉe l' plejpotenca!“ li kriis. „Estu plena de melankolio, se tio plaĉas al vi. Sed tio ne estas la maniero de bonkondukita edzino, kaj se vi povus pensi iom ankaŭ pri mi, vi ekhontus!“

Post tio li foriris kaj Kokua estis sola.

Kiun bonŝancon ŝi havos vendi la botelon por du centimoj? Neniun, ŝi perceptis. Kaj se ŝi havus bonŝancon, ĉu estus tiukaze ŝia edzo, kiu volus

rapide foririgi ŝin al lando, kie estas io malpli valora ol cendo. Kaj ĉimomente— je la mateno de ŝia memoferiĝo — ŝia edzo riproĉis kaj forlasis ŝin.

Ŝi eĉ ne provis profiti de la tempo, kiun ŝi ankoraŭ havos, sed sidis en la domo, elpreninte la botelon, kaj rigardis ĝin kun nedirebla timo, kaj nun kun abomeno denove kaŝis ĝin nevidebla por rigardoj.

Post certa tempo Keave revenis, kaj celis, ke ŝi akompanu lin dum ekskurso.

„Edzo mia, mi estas malsana“, ŝi diris. „Mi fartas malbone. Pardonu, mi ne povus plezurigi min.“

Nun Keave fariĝis pli kolera ol iam antaŭe. Pro ŝi, ĉar li pensis, ke ŝi cerbumas pri la kazo de la maljuna viro; kaj pri si mem, ĉar li pensis, ke ŝi ja pravas, pro la honto senti sin tiom feliĉa.

„Tio estas via fideleco, kaj via sindonemo al mi! Via edzo estas ĵus savita de la eterna kondamno, kiun li ŝarĝis sur sin, ĉar li amas vin — kaj vi eĉ ne ĝojas pri tio! Kokua, vi havas nelojalan koron.“

Li denove foriris kolere kaj vagadis dum la tuta tago en la urbo. Li renkontis amikojn kaj trinkis kun ili; ili luprenis ĉaron kaj veturadis kampare, kaj tie drinkis denove. Dum la tuta tempo Keave fartis neoportune, ĉar li plezurigis sin, dum lia edzino estis malĝoja, kaj ĉar li sciis profunde en sia koro, ke ŝi pli pravas ol li mem; kaj tiu scio drinkigis lin eĉ pli.

Inter la drinkuloj estis ankaŭ maljuna brutala blankulo, ulo, kiu estis ĉefmaato, fuĝinto, orofosisto, prizonkondamnito. Li havis malican menson kaj senbrideblan buŝon; li ŝategis drinki kaj observi aliajn ebriaj; tial li devigis drinki ankaŭ Keave-on. Baldaŭ neniu plu havis monon en la societo.

„He, vi!“ diris la ĉefmaato „vi estas riĉa, tion vi ĉiam asertis. Vi havas botelon, aŭ iun similan stultulaĵon.“

„Jes,“ diris Keave. „Mi estas riĉa. Mi iros hejmen kaj alportos iom da mono de mia edzino, kiu konservas ĝin.“

„Tio estas malbona ideo“ , diris la ĉefmaato. „Neniam konfidu al inaĉo dolarojn. Ili ĉiuj estas perfidemaj

kiel akvo; ĉiam observu ŝin.“

Tiu diro tre frapis la atenton de Keave, ĉar li estis ebria de tio, kion li drinkis.

„Mi ne miru, se ŝi estus perfidema, efektive“, li pensis. „Kiel ŝi povas esti tiel deprimita dum mia saviĝo? Sed mi montros al ŝi, ke mi ne estas la viro, kiu lasas kondukadi sin je la nazo. Mi kaptos ŝin dum freŝa faro.“

Sekve tion, Keave, kiam ili denove estis en la urbo, petis la ĉefmaaton atendi lin je la angulo ĉe la malnova karcerio, kaj iris sur la aleo sola al la pordo de sia domo. La nokto revenis denove; estis lumo interne, sed neniuj sono aŭdeblis kaj Keave ŝtele aliris, malfermis softe la malantaŭan pordon kaj rigardis internen.

Tie Kokua sidis surplanke, kun lampo ĉeflanke, antaŭ ŝi troviĝis lakta blanka botelo kun longa kolo kaj ronda korpo, kaj Kokua rigardis ĝin kaj dum tio luktigis la manojn.



Dum longa tempo Keave staris ĉe la pordo kaj rigardis internen. Unue li estis perpleksa; kaj tiam li ektimis, ke la marĉanda rezulto povus esti nevalida, kaj ke la botelo revenis al li, kiel ĝi revenis en San-Francisko; kaj tial liaj genuoj moliĝis, la nebulo de la vino fuĝis el lia kapo kiel matenaj nebuloj for de rivero. Kaj poste li havis alian penson, kaj tiu estis tiel stranga, ke ĝi ardigis liajn vangojn.

„Mi certigos min pri tio“, li pensis.

Tial li fermis la pordon kaj iris denove ĉirkaŭ la angulon kaj poste eniris brue tra la frontpordo, kvazaŭ li ĝuste en tiu momento revenus hejmen. Kaj jen! Kiam li malfermis la pordon, la botelo estis malaperinta kaj Kokua sidis en seĝo kaj ekmoviĝis kvazaŭ ŝi ĝuste vekigis el dormo.

„Mi drinkis dum la tuta tago kaj gajis“, diris Keave.  
„Mi estis inter bonaj kompanoj, kaj nun mi nur revenas por preni monon, kaj poste mi reiros al ili por drinke ekscesi plu.“

Kaj lia vizaĝo kaj lia voĉo estis severaj, kiel tiuj de juĝisto dum verdikto, sed Kokua estis tro ŝarĝita por

observi tion.

„Vi agas bone disponi pri via propra posedo, edzo mia“, ŝi diris kaj ŝia voĉo tremis.

„Ho, mi agas ĉiam ĝuste“, diris Keave, kaj li iris rekte al la kesto kaj elprenis monon. Sed krome li rigardis en la angulon, kie ŝi konservis la botelon, sed ne estis botelo tie.

Jen subite la kesto kvazaŭ leviĝis supren kiel mara ondo kaj la domo kvazaŭ turniĝis ĉirkaŭe kiel fumringo, ĉar li ekkomprenis nun, ke li estas perdita kaj, ke ne plu eblas eskapo. „Jen tio, kion mi timis“, li pensis. „Estis ŝi, kiu aĉetis ĝin.“

Kaj tiam li iom rekolektis siajn fortojn kaj ekstaris; sed ŝvito torentis sur lia vizaĝo tiel densa kiel pluvo kaj tiom frida, kiom fontakvo.

„Kokua,“ li diris, „mi diris hodiaŭ al vi fi-vortojn, kiuj fartigis min malbone. Nun mi reiros al miaj gajaj kompanoj.“ Kaj dum tio li sufoke ridis. „Mi havos pli da plezuro dum la drinkado, sed vi pardonos al mi.“

Ŝi mantuŝis liajn genuojn kaj kisis ilin kun fluantaj ploroj.

„Ho,“ ŝi vokis, „Mi petis nur pri afabla vorto!“

„Neniam denove ni reciproke pensu aĉe pri la alia“, diris Keave kaj foriris el la domo.

Ĉifoje, la monon, kiun Keave prenis, estis nur unu monero de la ŝanĝmono el la centimoj, kiujn ili metis flanken dum ilia alveno. Estis tute certa, ke li ne havis la intencon ekiri por drinki plu. Lia edzino donis sian animon por lia, nun, li pensis, li devos doni sian por ŝia; neniuj alia penso aktuale havis lokon en lia mondo.

Ĉe la angulo apud la malnova karcero la ĉefmaato atendis lin.

„Mia edzino havas la botelon“, diris Keave, „kaj se vi ne helpas al mi reakiri ĝin ĉivespere, ni nek havos monon nek likvoron.“

„Ĉu vi eble eĉ opiniis tion serioze pri la botelo“,  
ekkriis la ĉefmaato.

„Jen la lanterno“, diris Keave. „Ĉu mi aspektas kiel  
ŝerculo?“

„Efektive,“ diris la ĉefmaato. „Vi aspektas tiel serioza,  
kiel fantomo.“

„Do, en ordo“, diris Keave, „jen du centimoj; vi devos  
iri al mia edzino kaj aĉeti de ŝi la botelon, kiun (se mi  
ne tute eraras) ŝi redonos tuj al vi. Portu ĝin ĉi tien  
kaj mi reaĉetos ĝin de vi por centimo; ĉar tio estas la  
kondiĉo de la botelo, ke la botelo devas esti vendata  
por malpli granda sumo. Sed kion ajn vi faros,  
neniam eĉ ne flustru ion pri tio, ke vi venis de mi.“

„Kamarado, mi miras, ĉu vi volas fari stultulon el  
mi?“ demandis la ĉefmaato.

„Tio ne povas damaĝi al vi, ĉar mi estas mem la  
stultulo,“ rediris Keave.

„Vi pravas, kamarado“, diris la ĉefmaato.

„Kaj se vi dubas pri mi“, aldonis Keave „vi povos elprovi ĝin. Tuj, kiam vi estos forlasinta la domon, deziru, ke via poŝo estu plena de mono, aŭ deziru botelon de la plej bona rumo, aŭ kion ajn krome, kaj tiel vi ekkonos la virton de la aĵo.“

„Tre bone, kanako,“ diris la maato. „Mi provos; sed, se vi mistifikis min, mi mistifikos vin per piratohoko.“

Tion dirinte, la balenkaptisto foriris sur la aleo kaj Keave restis staranta kaj atendis. Estis proksime de la loko, kie atendis Kokua je la vespero antaŭe; sed Keave estis pli decidiĝinta kaj neniam fariĝis ŝanceliĝema pri sia intenco; nur lia animo estis amarsenta pro despero.

Ŝajnis, ke li devis atendi dum tre longa tempo antaŭ ol li ekaŭdis voĉon kantantan en la tenebro sur la avenuo. Li sciis, ke ĝi estas de la ĉefmaato; sed estis strange, kiom ebria li aperis subite.

Poste la viro mem venis stumblante en la lumon de la lanterno. Li estis metinta la botelon de la diablo sub

sian butonumitan mantelon; alian botelon li tenis  
permane; kaj eĉ kiam li aperis en la vidkampo, li levis  
ĝin al la buŝo kaj drinkis.

„Vi ĝin havas“, diris Keave. „Mi vidas.“

„La manojn for!“ kriis la ĉefmaato, saltante  
malantaŭen. „Se vi proksimiĝos eĉ nur je paŝo, mi  
frakasos vian grimacon. Ĉu vi eble pensas, ke vi  
povus meti kvazaŭ katpiedon sur min, ĉu vi pensas  
tion?“

„Kion vi opinias per tio?“ vokis Keave.

„Opinias, ĉu?“ revokis la ĉefmaato. „Tio estas vere  
altkvalita botelo, jen tio, kion mi opinias. Kiel mi  
ricevis ĝin por du centimoj, tion mi ne povas klarigi  
al mi; sed mi estas certa, ke vi ne reakiru ĝin por unu  
centimo.“

„Vi opinias, ke vi ne intencas vendi ĝin, ĉu?“  
spirkraĉis Keave.

„Jes, siro!“ vokis la ĉefmaato. „Sed mi donos al vi

gluton de la rumo, se vi ŝatas.“

„Sed mi diras al vi,“ objetis Keave, „la viro, kiu havas la botelon kaj ne vendos ĝin antaŭ sia morto, transmondiĝos inferen.“

„Mi supozas, ke mi iros tien ĉiel“, respondis la maristo, „kaj ĉi tiu botelo estas la plej bona, kion mi povos kunpreni, kaj kion mi renkontis ĝis nun. Jes, siro!“ li kriis denove „tio estas nun botelo mia, kaj vi foriru kaj fiŝhoku alian.“

„Ĉu tio povas esti vera?“ Keave kriis. „Pro via propra beno, mi petas vin surgenue, vendu ĝin al mi!“

„Via babilado ne interesas min“, respondis la ĉefmaato. „Vi pensis, ke mi estas mensmalforta; sed nun vi spertas, ke mi ne estas tia, kaj nun estu fino pri tio. Se vi ne volas havi gluton de mia rumo, mi trinkos ĝin mem. Je via sano, kaj bonan nokton al vi!“

Tiel li do foriris sur la aleo en la urbodirekto, kaj tie la botelo eliris de la rakonto.

Sed Keave rekuris al Kokua facile kiel vento; kaj granda estis ilia ĝojo en tiu nokto; kaj grandiozaj kaj pacaj estis de tiam ĉiuj iliaj tagoj en la Pura Domo.

## **GLOSARO**

\* holokuo (neologismo): tre longa havaja robo  
PIV

\*\* le/o ⚓ Tiu flanko de ŝipo, kiu estas ŝirmita kontraŭ la vento.

lee = mallofe. ➡ [lofo](#).



## **PRI LA TRADUKO**

Tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser kun Frank Vohla laŭ la angla originalo el [vikifonto](#).

Lingve kontrolis Vladimir Türk.

Aranĝis Hans-Georg Kaiser.

## **REDAKTOFINO**

je la 25-a de marto en la jaro 2019